## La "rago", baza modelo melodia en hinda muziko

En la hinda muziko la ragoj okupas centran pozicion. La vorto "rago" originas el la sanskrito kaj signifas unualoke "kolorigado". Ragoj estas melodiaj modeloj, kiuj kvazaŭ kolorigas, pere de animstato, la senton.

La vorto ne troviĝas en Plena Ilustrita Vortaro (PIV) de Esperanto, almenaŭ ne en ties 3a eldono 1987 nek ties suplemento. Sed "rago" estas trovebla kun la titolcitita signifo en Granda Vortaro *Esperanto-Deutsch* de *Erich-Dieter Krause* (1999), denova signo de la elstara amplekseco de tiu ĉi vortaro.

La rago baziĝas sur 3 apogaj pilieroj, nome
- la sonoj (almenaŭ kvin) por ascendo kaj descendo,
- la reciproka hierarĥio de la sonoj, kaj
- la maniero de la sona ornamado.

La karaktera, krea sono ene de la gamo nomiĝas *Amsha Svara* (superrega sono), *Vadi* (heroldo) aŭ *Jiva* (animo). Ĝi havas pozicion kvazaŭ reĝo. Ties "ministro" estas *Samvadi* (konsonanca sono), lia "vasalo" *Amuvadi* (asonanca sono) kaj la "malamiko" estas *Vivadi* (disonanca sono). La ragoj do tradicie estas "personigitaj", kaj jam ekde la 15a jarcento ankaŭ vere "figuritaj" en formo de miniaturoj.

La hinda muzika gamo konsistas ne el la latindevena "*do - re - mi...*" - gamo sed el *Sa, Ri, Ga, Ma, Pa, Dha* kaj *Ni.* Al ĉiu sono estas alordigita certa sento, respektive certa sentimento. Tio devenas de la antikva teatropraktiko, kiam - dum recitado de la teksto - la unuopaj sonoj estis esprimo de certaj animstatoj. Tiel oni asocias al *Ma* kaj *Pa* amon kaj gajecon, al *Ma* ankaŭ trankvilon kaj pacon, al *Sa* kaj *Pa* kuraĝon, koleregon, miron kaj surprizon, al *Ni* kaj *Ga* kompaton, al *Dha* naŭzon, abomenon kaj timon.

En la muzikformo de la ragoj (kiuj estas de Dia origino kaj tial de ekstreme impresiva efiko al la homa animo) la superregaj sonoj kreas la animan sentostaton. Ili kapablas eksonigi ĉiun ajn nuancadon de sentoj kaj esti alordigataj al tagaj kaj jaraj sezonoj, al astroj, al Dioj, kaj al multnombraj aliaj naturpovoj kaj fenomenoj.

*Elisita Smailus*
*Via Bora di Besa 17*
*CH - 6925 - Gentilino*
SVISLANDO



# Scienca Revuo

## atendas vian propraplvman artikolon !

Ne ĉiu kapabla aŭtoro posedas komputilon
por prezenti bonan prifakan manuskripton
per interreto - sed aliflanke
ne ĉiu posedanto de por interreta komunikado ekipita
moderna komputilo kapablas prezenti
bonan propraplvman sciencan artikolon

La eldona stabo de Scienca Revuo akceptas manuskriptojn verkitajn per normala (malmoderna) tajpmaŝino prezentata

a) klare tajpita en bonstila, senerara Esperanto,
b) verkita pri propra esplorado aŭ ŝatokupo tiel, ke ĝin sufiĉe komprenu ankaŭ alifakuloj,
c) apartigita laŭ enkonduko / ĉefa resp. precipa(j) temo(j) / rezulto(j) / konkludo(j),
d) kun konciza resumo, kompleta adreso de la aŭtoro kaj mallonga priaŭtora informo,
e) kaj referenc-listo pri ĉiu en la teksto citita literaturaĵo.

Bv. sendi vian tiel verkitan manuskripton al la eldonanto de Scienca Revuo:

*Prof. Dr. R. Sachs*
*Vor dem Brückentor 3*
*DE - 37269 - Eschwege*
GERMANIO